BELGIO NEDERLANDO GERMANIO E

Senlime

Groupe espérantiste de Verviers

La Voĉo de Esperanto-grupo Verviersa

Avec le soutien de la Fédération Wallonie-Bruxelles

TRIMONATA INFORMILO PRI ESPERANTO EN LA VERVIERSA REGIONO

**En cas de non-distribution, merci de renvoyer à l'éditeur responsable:**
Jean-Marie **Jacques**,
5 rue Joseph Wauters
BE-4800 VERVIERS

## ENHAVO :

**p. 1: Trilanda renkontiĝo resurektigita!**
**p. 2: Verviersa kalendaro 2019 (2)**
**p. 3: Niaj programeroj lupee**
**p. 4: Verviersa angulo (*nouveau cours d'Esperanto*)**
**p. 5: Informations diverses – Informoj diversaj**
**p. 6: Trilanda renkontiĝo (detaloj,...).**

**Informations en français**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
Mail: jeajacques@voo.be
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren.media@planet.nl
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: klaus.hogen@web.de
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE:**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Abono al la **papera** versio de nia informilo (12 €) eblas sed **NE** en-havas la kotizon al ***Senlime*** (10 €).

Bonvolu pagi prefere jam en januaro **NUR** al la konto :
**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta) de ***Senlime***,
25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio

# *Senlime*

**Esperantista Grupo Verviersa**

**invitas vin al**

# Trilanda Renkontiĝo en Amikejo (BE-Kelmis)

## Sabaton, **la 29-an de junio 2019 (10h00-16h00)**

- 10h15 : gvidata vizito de la muzeo pri la «Vieille Montagne» aù komentata promenado en Kelmis (iama Amikejo)
- 12h00 : komuna tagmanĝo en restoracio «Alt Kerris»
- 14h15 : komentata promenado en Kelmis (iama Amikejo) aù gvidata vizito de la muzeo pri la «Vieille Montagne»
- 16h00 : adiaùo kaj disiĝo.

Aliĝkotizo (gvidataj vizitoj kaj tagmanĝo):
**31 EUR** (trinkaĵoj krome pagendaj).

Bonvolu **unue anonci vin** ĉe Jean-Marie **Jacques**, rue J. Wauters 5, BE- 4800 VERVIERS - Tel. +32 87 33 02 92 - jeajacques@voo.be

**Tuj** post la konfirmo de JMJ pagu **31 EUR** ĉe la konto BE41 9795 3271 4810 de Senlime (anonco sen pago senvaloriĝas post 10 tagoj). Klare menciu la celon de via pago, kiu nepre alvenu plej malfrue la **30-an de majo** (eventuala repago pro kiu ajn kialo poste neeblos).

# ESPERANTO✪

## Verviersa kalendaro 2019




***La grupo de Verviers*** publikigas ĉi-tie sian propran programon.

Tradicie, ***Trilandaj renkontiĝoj*** est***u*** organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ grupo en la Eŭregiono Mozo-Rejno.

Ili iam okazis dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL)...

Pro tio, tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de aliaj lokaj grupoj sed ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de Eo-aranĝoj (aliaj ekzistas).

**Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro kaj sekretario de la Verviersa Eo-grupo (*Senlime*-Verviers):**

**Jean-Marie Jacques (jeajacques@voo.be).**

**04-18---->22** Simmerath, **PEKo** Inf. doumontvalere@yahoo.fr

**04-19** 20h00 Kelmis, Select: prelego de Charles **Norga**: "Alia vidpunkto pri Harry Potter". Inf. norgacharlesetiennejean@gmail.com

**05-11** (horo k.t.p. decidotaj): Grupa foriro de Tilff al la centra oficejo de SAT en Parizo. Inf. viviane.mesanges@gmail.com

**05-17** 20h00 Kelmis, Select: prelego pri la senhejmuloj fare de Peter **Parren**. Inf. Parren@senlime.org

**06-21** 20h00 Kelmis, Select: vespero karaokea de ***Senlime***. Inf. jeajacques@voo.be

**06-29** Trilanda renkontiĝo en Kelmis: vizito de ***Amikejo*** kaj de la Muzeo pri ***La Vieille Montagne***

**07-19** Somera paŭzo: ni **NE** kunvenos.

**08-16** Somera paŭzo: ni **NE** kunvenos.

**09-20** 20h00 Kelmis, Select: ĝenerala asembleo de **VEG. + Vojaĝo en Irlando (1/2)** Filmo de Jean-Marie **Jacques.**

**04-18---->22** Simmerath, **PEKo** Inf. doumontvalere@yahoo.fr

**19-04** 20h00 Kelmis, Select: conférence de Charles **Norga**: "Un autre point de vue sur Harry Potter". Inf. norgacharlesetiennejean@gmail.com

**11-05** (heure, etc. à décider): Départ groupé de Tilff vers le centre de SAT à Paris. Inf. viviane.mesanges@gmail.com

**17-05** 20h00 Kelmis, Select: conférence sur les sans-abris par Peter **Parren**. Inf. Parren@senlime.org

**21-06** 20h00 Kelmis, Select: soirée karaoké de ***Senlime***. Inf. jeajacques@voo.be

**29-06** Rencontre des trois pays à Kelmis: visite d'***Amikejo*** et du musée de ***La Vieille Montagne***

**19-07** Pause d'été: nous **NE** nous réunirons **PAS**.

**16-08** Pause d'été: nous **NE** nous réunirons **PAS**.

**20-09** 20h00 Kelmis, Select: assemblée générale de **EGV. + Vojage en Irlande (1/2)** Film de Jean-Marie **Jacques.**

# Niaj programeroj lupee

*detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…*

**Alia vidpunkto pri la "sorĉisto" HARRY POTTER**

Charles Norga proponas al ni elmontri alian vidpunkton relative al tiu memorinda verko de J. K. Rowling. Ĝi rakontas la vivon de la juna "sorĉisto" Harry Potter.

Tiu rakonto uzis fantazion, ne akcepteblan por kleruloj kiel ni. Ni estas tiaj seriozaj personoj kiuj ne priatentas al la imago-povo. Al la imago-potenco, ĉu?

Ĉu kelkaj el ni ne estas instruistoj, profesoroj, k.t.p.? Kaj ĉu tio, kio apartenas al la imageblado, ne dignas esti konsiderita kiel seriozaĵo?

Tamen ĉar ni apartenas al la tiel nomata serioza mondo, ni tamen devas konscii ke, se infanoj ne havus la eblecon imagi, ili ne kapablus kompreni la "por ili" strangan diraĵon de siaj instruistoj.

**La instruado devigas eduki laŭ precizaj reguloj, kaj restigi la lernantojn meze de iaj fervojaj reloj, sen rigardi eksteren. Fakte tiel ili havus kvazaŭ-okulŝirmilojn.**

Tio taŭgas, sed bedaŭrinde, ek de la diplomitiĝo, vi riskas konservi tiajn okulŝirmilojn kaj resti enkarcerigita en via fako, kaj ne plu povus vidi nematerian vidaĵon.

Danke al la fantazia libro de J.K Rowling, vi povus reveki vian imag-potencon.

Charles Norga intencas montri al ni iajn vojojn...

**04-19** 20h00 Kelmis, Select: "Alia vidpunkto pri Harry Potter". Inf. Charles **Norga**
norgacharlesetiennejean@gmail.com

**Prelego pri la senhejmuloj fare de Peter Parren.**

Nuntempe regas stranga paradokso. Ekzistas 30 miloj da neokupataj domoj sed ankaŭ 20 miloj da senhejmuloj. Ekzistas miliardoj da eŭroj por subteni la bankojn, sed mankas moneroj por la senhejmuloj.

Ekzistas Kristnasko, tempo por ĝentileco kaj helpemo, sed la senhejmuloj ofte estas forgesataj.

En Irlando ekzemple grupo da senhejmuloj kaj aktivuloj eniris neokupatan konstruaĵon (kiun oni planis detrui) kaj komencis transformi la konstruaĵon en loĝejon por 35-40 homoj.

La grupo konsistis el senhejmuloj, aktivuloj kaj sindikatistoj. Multaj irlandaj muzikistoj kaj aktoroj kiel Glen Hansard, Damien Dempsey, Jim Sheridan kaj Hozier partoprenis kaj subtenis la grupon.

Senhejmeco estas kreskanta problemo. Ankaù en Begio, parte sekve de la alveno de rifuĝintoj, la nombro de senhejmuloj kreskas, dum ekzistas certe dekmiloj da malplenaj domoj en la lando.

La stratoj ne estas komfortaj dormolokoj dum la malvarma kaj malseka vintro...

Jam antaùlonge, nia samideano Peter volis eksperimente provi tion... Venu aùskulti lin! ➞

Certe utile pripensiga vespero...

**05-17** 20h00 Kelmis, Select: "Prelego pri la senhejmuloj". Inf. Peter **Parren**
parren.media@planet.nl

**Vespero karaokea**

Ja estas nun konate ke ***Senlime*** regule organizas sian propran karaoke-vesperon en Kelmis, fine de junio, agrabla maniero ĝisrevidi fine de la lerneja jaro. Kelkajn himnojn ni ankaŭ kelkfoje kantas okaze de festoj kiel la Zamenhofa en decembro, k.t.p.

Karaoke kompreneble ne havas nur ludan celon, ĝi ankaŭ havas grandan kulturan valoron, se oni konsideras ke ĝi permesas konatigi eksterlandajn kantojn (kaj tiele kulturon) enlande… kaj inverse.

Sed eĉ plie ni povas konatigi la esperantistan kulturon kaj lingvon al neesperantistoj. Tiel karaokeo fariĝas lingvo-instruilo.

Ĉi-jare, laŭ mi, ne estis nepre rimarkinda okazo por festi, do estos nenia speciala temo por tiu-ĉi karaokearo: vi do povos libere elekti el nia vasta kantaro tion, kion vi ŝatus kunkanti (aù aùdi).

Se vi aliĝis/os al la yahoo-grupo «***Amikejo***» vi eĉ povas senpage elŝuti el ties dosiero «Fichiers» kelkajn el la karaokeoj kreitaj aŭ adaptitaj de ***Senlime***, kaj rekte uzi ilin per via komputilo.

**Grava atentigo: la Select (kultur-centro de Kelmis, kie ni kunvenas) estas fermita ĝis plia informo. Ni do ne povas garantii ke niaj kunvenoj plu okazos tie. Informiĝu ĉu rete ĉu alimaniere antaŭ ol veturi al nia kunveno. Multan dankon!**

**06-21** 20h00 BE-Kelmis, Select: karaokeo de ***Senlime***.
Inf. Jean-Marie **Jacques**
jeajacques@voo.be

# Verviersa Angulo

**Comité de E.G.V.:**
Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79
Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30
Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

**Ass. pour l'Espéranto (A.P.E.):**
www.esperanto-wallonie.be
Bernadette Poncelet, secrétaire
103 rue Windt
4850 PLOMBIERES
Tél. 087/39.85.70
bernadetteponcelet@skynet.be

## Cotisations

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte

**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information n'est plus intégré à la revue de APE «Espéranto en marche», qui a choisi une solution plus professionnelle...*

*La cotisation pour **EGV-Senlime** reste fixée à **10 Euros** (ou 22 Euros si vous voulez un abonnement à cette revue sur papier).*

**Indiquez les nom, prénoms et domicile du membre cotisant:**
***«cotisation de.… pour....»***

# Nouveau cours d'esperanto dans la région de Verviers

Nous donnerons un nouveau cours d'espéranto (en 10 leçons de 2 heures) basé sur «Tintin et le temple du soleil» (en espéranto évidemment!) dès la rentrée scolaire prochaine...

L'espéranto est la seule langue dont les bases peuvent s'acquérir en quelques heures seulement.

Tout simplement parce que sa grammaire tient en une seule page et se maîtrise donc très rapidement. Son orthographe et sa prononciation sont idéalement simples: chaque lettre de l'alphabet se prononce d'une et une seule manière.

Enfin, son vocabulaire, dérivé des grandes langues existantes, dont le français, vous semblera très facile. De plus, un ingénieux système permet de fabriquer de nouveaux mots à partir des mots (ou racines) de base.

Notre vidéo sur YouTube: «Pourquoi apprendre l'espéranto» (déjà vue par plus de 10000 personnes) vous explique en détail les avantages de l'espéranto par rapport aux autres langues (et en particulier l'anglais).

Un seul exemple: dans mon Larousse, je trouve 115 conjugaisons différentes, à étudier (et il faut savoir, pour chaque verbe, quel modèle choisir!). A l'école primaire, mon instituteur de 4e année a consacré, pendant 1 an, 1 heure chaque après-midi (plus de 120 heures) à nous faire conjuguer des verbes...

En espéranto, tous les verbes à l'infinitif se terminent par **i**: vid**i**=voir, am**i**=aimer, lud**i**=jouer, lern**i**=apprendre,... et il n'y a qu'une seule conjugaison:

Mi lern**as**=j'apprends
ci lern**as**=tu apprends
li lern**as**=il apprend
ni lern**as**=nous apprenons
vi lern**as**=vous apprenez
ili lern**as**=ils apprennent.

Ainsi, tous les verbes au **présent** se terminent par **-as**... et vous savez déjà conjuguer tous les verbes au présent. Essayez par exemple avec vid**i** (voir).

Pas besoin de vous donner la correction. Et tout est semblable en espéranto: toutes les règles sont faciles et sans exception!

Vous me direz peut-être: oui, mais le vocabulaire, il faut quand même l'apprendre. Certes, et c'est bien pourquoi l'espéranto demande quand même quelques heures d'étude.

Notre cours pour débutant vous donnera toutes les règles et les principaux mots de vocabulaire (l'université de Zagreb a procédé à un relevé des mots utilisés et de leur fréquence dans les conversations). Ce sont évidemment les mots les plus fréquents que vous devrez étudier d'abord. Savez-vous qu'un concierge parisien n'utilisait que 900 mots de français... (il en avait certes entendu bien plus, mais il ne les a pas compris ou les a oubliés). Il en va à peu près de même en espéranto...

Sauf que certains mots sont très faciles: par exemple, les contraires se forment simplement en ajoutant un préfixe **-mal**:
-bela=beau, **mal**bela=laid;
-lerta=adroit, **mal**lerta= ... ;
-varma=chaud, ... =froid;
-logika=logique, **mal**logika=... etc.

Ça vous intéresse? Contactez-moi pour tout renseignement!

J.M. Jacques

# Pri nia Trilanda Renkontiĝo
# A propos de notre «rencontre des 3 pays».

**Traité de Versailles**

Elaboré au cours de la Conférence de Paris, le Traité de Versailles est signé le 28 juin 1919, date anniversaire de l'attentat de Sarajevo (point de départ de la guerre 1914-1918), dans la galerie des Glaces du château de Versailles, et promulgué le 10 janvier 1920.

Il annonce la création de la Société des Nations (SDN) et détermine les sanctions prises à l'encontre de l'Allemagne et de ses alliés. Celle-ci, qui n'est pas représentée au cours de la conférence, est amputée de certains territoires, comme les cantons germanophones de l'est de la Belgique, dont le territoire neutre depuis 103 ans de Moresnet (Amikejo – lieu de l'amitié - pour les espérantistes). Elle est en outre privée de ses colonies, astreinte à de lourdes réparations économiques et à d'importantes restrictions de sa capacité militaire.

A l'occasion de cet anniversaire, le groupe espérantiste de Verviers ajoute exceptionnellement une nouvelle "Rencontre (des espérantistes) des trois pays" (Allemagne, Pays-Bas, Belgique) à une série interrompue depuis bientôt 7 ans... à Verviers (le 8 octobre 2012 à l'occasion d'un concert exceptionnel).

**Invitation cordiale à tous**... et en particulier à nos amis des deux autres pays de l'Eurégio Meuse-Rhin: Allemagne et Pays-Bas!

**Versajla traktato**

Ellaborita dum la Pariza Konferenco, la Traktato de Versajlo estas subskribita la 28-an de junio 1919, datreveno de la atenco en Sarajevo (deirpunkto de la milito 1914-1918), en la Versajla salonego de la speguloj kaj proklamita la 10-an de januaro 1920.

Ĝi anoncas la kreadon de Ligo de Nacioj (SDN) kaj difinas la sankciojn kontraŭ Germanujo kaj ĝiaj aliancanoj. Ĉi tiu, kiu ne estas reprezentita dum la konferenco, estas amputita de kelkaj teritorioj, kiel la la germanlingvaj kantonoj de orienta Belgio, inkluzive de la teritorio de Moresnet neŭtrala jam de 103 jaroj (Amikejo - loko de amikeco - por la esperantistoj).
Ĝi estas ankaŭ senigita je siaj kolonioj, devigata al pezaj ekonomiaj riparoj kaj al gravaj limigoj de sia milita kapacito.

Okaze de tiu datreveno, la esperantista grupo de Verviers escepte aldonas novan «Trilandan Renkontiĝon» (de la esperantistoj) el la tri landoj (Germanio, Nederlando, Belgio) al la serio interrompita jam de baldaù 7 jaroj... en Vervierso (la 8an de oktobro 2012 okaze de escepta koncerto).

**Koran inviton al ĉiu**j... kaj aparte al niaj geamikoj el la du aliaj landoj de l'Eùregiono Mozo-Rejno: Germanio kaj Nederlando!

**Select fermita**

Dum dek-unu jaroj, la iama ekonomo, Pascal **Jaminon**, funkciigis la restoracion en la kulturdomo Kelmisa. Tuj post la karnavalo li bankrotis. La areo kafeja kaj la restoracio estas do fermitaj ĝis nova avizo.

La lokaj kluboj kiuj tie kunvenis kaj havas propran ŝlosilon plu povas uzi siajn ejoj, decidis la urbestro Luc Frank,... kvankam ili ne plu povas tie trinki kaj konsumi (ni ne havis propran ŝlosilon sed la iama restoraci-estro Pascal Jaminon malfermis por ni la 19-an de aprilo).

Ĉu ni poste plu povos kunveni en Select? Ni atendas respondon kaj instrukciojn (tio jam okazis antaù dek-unu jaroj kaj tiam ni havis la malagrablan devon sinsekve utiligi plej diversajn kunvenejojn en Kelmis).

La urbestro esperas ke la restoracio kaj la kultur-centro baldaù normale refunkcios, sed la kontrakta situacio devas unue esti klarigita (des pli ke estas enketo pro ŝtelo en la domo).

**Tial ni ve ne povas uzi la tradician esperantistan kultur-domon por nia trilanda-renkontiĝo.**

Ni do ne povos kune retroviĝi, trinki (kaj maltrinki) antaù (kaj post) la vizitoj (de la muzeo aù de Amikejo).
La rendevuo do estas en la muzeo mem por la vizitantoj, antaù tiu muzeo por tiuj kiuj unue promenos...
Ni pardonpetas pro tiu malĝoja okazaĵo (ni tamen kune tagmanĝos en apuda restoracio «Alt Kerris»).

# Pri nia «Trilanda Renkontiĝo»
# A propos de notre «rencontre des 3 pays».

**__Unue__ necesas memori ke sufiĉe frue (iun sabatan matenon) alveni en Kelmis per trajno kaj/aŭ buso malfacilas...**

Por kuraĝuloj tamen eblus foriri de Verviers-Central je la 8h27 kaj alveni en Hergenrath je la 8h48... Tiu stacidomo estas nur 3 km for de la muzeo (pli ol 30 min. Piede sed la 3a km estus tute feina: piede de la kastelo Eyneburg, tra arbaro, ĝis la bela lageto)...

**(Kun)veturado ja necesas.**

Alia problemo: alvenante, vi **__ne__** tuj disponos pri **necesejo**. Ni do ege konsilas al vi survoje halti tie, kie estas uzebla necesejo. Ekzemple:
- en aŭtovoja restoracio Barchon
- en Moresnet-Chapelle
(pl. Arnold Franck 1, Plombieres).
- en Kelmis, rue de l'Eglise 31 (senpage, apud la urbo-domo)
- en Kelmis, «**Au Petit Café**» Lieĝa strato, 196 (trinkejo) se vi alvenos sufiĉe frue por kafumi...

Agrabla sed luksa ideo estus loĝi en «Park-Hotel» de Kelmis: http://parkhotelkelmis.be
Atentu ke ĝi estas aŭtomate funkciigata (neniu nokte deĵoras): alvenu sufiĉe frue (antaŭ la 18a) kaj vi ricevos personan karton por (re)iri en vian ĉambron!

Kompreneble vi ankaŭ povus loĝi en Akeno (8 km for), kie vi povus elekti inter plej diversaj hoteloj... kaj junular-gastejo.

**__Uf! Vi alvenis...__**

**La muzeo** (nia rendevuejo) facile troveblas Lieĝa strato, 280-286 (proksime de la Select). Ĝi rakontas la historion de zinko en la regiono kaj ĝiaj politikaj, sociaj kaj ekonomiaj konsekvencoj. Vi tie revivos la nekredeblan historion de la neŭtrala teritorio de Moresnet (1816-1919) k.t.p.

Vidu filmeton pri la muzeo:
https://www.youtube.com/watch?v=vQrxM-_BKZw

La r**estoracio «Alt Kerris»** estas tute proksima de la muzeo, iom grimpinte: Lieĝa strato, 232.

**Via menuo:**

- Taga kremaĵo
- Panumita eskalopo
  kun Porto-saŭco
- "Blanka Damo" (vanila glaciaĵo).

**Trinkaĵoj je viaj kostoj** (bonvolu ilin pagi sufiĉe frue por ne bremsi la grupojn).

**Komentita promenado** ebligos al vi (re)vidi la spurojn de la iama ***Amikejo:*** multo estas detruita aŭ modifita sed vi de ekstere (re)vidos la iaman hotelon Bergerhof (nune Select), la provizoran UEA-oficejon, la iaman domon de la direktoro de la zink-entrepreno (nune Park-Hotelo), la iaman bazlernejon kie centoj da infanoj lernis esperanton (nune urbo-domo), la preĝejojn katolikan kaj protestantan (kun la tombo de la fama D-ro Molly), k.t.p.



La renkontiĝo finiĝos tie, kie ĝi komenciĝis: antaŭ la muzeo... Ni jam deziras al vi bonan tagon en Kelmis, la iama ***Amikejo***.

**Les timbres postaux d'Amikejo**

Le 1er octobre 1886, le Dr Molly a émis une série de timbres pour la distribution du courrier en territoire neutre. Ils ont été interdits après seulement deux semaines. Pour le courrier à destination de la Belgique, il fallait utiliser des timbres belges, pour l'Allemagne, des timbres allemands.

A l'occasion de 100e anniversaire de l'abolition de l'Etat Neutre de Moresnet, la poste a réalisé une émission limitée de timbres-poste. Comment les acheter?
- Sur internet, tapez "https://eshop.bpost.be/fr/philately/collectionneur" et introduisez le code 31268
- ou envoyez un message à philately@bpost.be
- Ou allez à la phila-boutique: Egide Walschaertsstraat 1b, 2800 MECHELEN ***ou*** boulevard Anspach 1, 1000 BRUXELLES.

**La poŝtmarkoj de Amikejo**

La 1an de oktobre 1886, la Dr-o Molly, eldonis poŝtmarkojn por la sendo de leteroj sur la teritorio neŭtrala. Ili estis malpermesitaj post nur du semajnoj.
Por sendi ion al Belgio, necesis utiligi belgajn poŝtmarkojn; al Germanio, germanajn markojn.

Okaze de la 100-a datreveno de la forigo de la Neŭtrala ŝtato de Moresneto, la poŝto realigis limigitan elsendon de poŝtmarkoj. Kiel aĉeti ilin?
Rete, tajpu "https://eshop.bpost.be/fr/philately/collectionneur" kaj enkonduku la kodon 31268 – aŭ sendu mesaĝon al philately@bpost.be.